# Sud-Rejna Kuriero

Oktobro 2018

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel** kaj **Mulhouse-Esperanto**

N°70

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*



*Ĉi-tiu numero aperas iom pli malfrue, nur en oktobro. Tiel jam eblas informi vin pri nia venonta Zamenhof-festo, kiu okazos ĉi-jare en Frajburgo. Dank'al Manfred Westermayer ni jam povas prezenti al vi la programon.*

*Lastjunie sinsekve okazis "Komuna Manĝo" de nia grupo Mulhouse-Esperanto, "Amika Tago" en Frajburgo kaj "Verda Fadeno".*

*Certe la plej gravaj eventoj de ĉi-tiu somero ja estis la Esperanto-kongresoj, kiuj okazis en Hispanio kaj en Portugalio. Pri tiuj eventoj pluraj gazetoj aperigis raportojn, komentojn kaj fotojn.*

*Same ankaŭ nia regiona gazeto La Informilo raportis pri ili. Tial en ĉi-tiu numero ni preferas mencii nur tute lokajn eventojn aŭ kongresajn personajn spertojn. Je tiaj okazoj Bernard akiris interesajn librojn, pri kiuj li volonte raportas.*

*Krome komenciĝis niaj kursoj en Espace 110 kun novaj horaroj. Sed bedaŭrinde kelkaj antaŭaj lernantoj jam ne aliĝis al la kurso.*

*En Espace 110 ni deĵoris okaze de malfermitaj pordoj la 3an de oktobro.*

*En Wesserling ĉe la libro-foiro deĵoris Roberto por informi pri Esperanto.*

*Same estis planita deĵorado ĉe la ekologio foiro en Ungersheim meze de novembro, kie ni renkontis plurajn samideanojn.*

*André Grossmann*

# Programo 2018   2019

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

| | | |
|---|---|---|
| **Sabate** | **15.12.2018** | **Zamenhofa festo en Frajburgo Germanio** |
| **Lunde** | **28.01.2019** | **Verda Fadeno 'Porte de France'** |
| **Ĵaŭde** | **28.02.2019** | **Monata kunveno: Ĝenerala Jarkunveno** |
| **Lundo** | **25.03.2019** | **Verda Fadeno 'Porte de France'** |
| **Ĵaŭde** | **25.04.2019** | **Monata kunveno: Maroko** |
| **Lundo** | **27.05.2019** | **Verda Fadeno 'Porte de France'** |
| **Jaùdo** | **25.06.2019** | **Monata kunveno: Akropolis Inzlingen** |
| | **07.2019**<br>**08.2019** | **Ferioj** |
| **Ĵaŭde** | **26.09.2019** | **Monata kunveno: Babilado pri somero** |
| **Lunde** | **28.10.2019** | **Verda Fadeno: 'Porte de France'** |
| **Ĵaŭde** | **28.11.2019** | **Monata kunveno: Programo 2020** |
| **Sabate** | **14.12.2019** | **Zamenhofa festo en Francio** |

**Nicole Béroud**

# JARRAPORTO 2018

**Kiel ĉiu jare, raporto estas la okazo trarigardi la aktivecojn de la jaro :**

**En januaro okazis nia Jarkunveno en  Riehenring 131, kie estas vere ege agrable kunveni.**

**En februaro por la kunveno ni kunsidis en agrabla rondo denove en Saint-Louis, ĉe la restoracio 'Porte de France' kie ni rajtas uzi la apartan salonon.**

**En marto ni babilis kviete dum la monata kunveno.**

**En aprilo “Verda fadeno” ni denove kunvenis en restoracio ' Porte de France' kie oni agrable povas kunveni.**

**En majo ni renkontriĝis ĉe Grün 80 dum belega somera vespero**

**En junio, ni denove kunvenis en la restoracio “Porte de France” en Saint-Louis kaj babilis agrable kune.**

**Post la ferioj la temo de la septembra monata kunveno estis pri niaj someraj aktivecoj. Ĉar ni volis renkontiĝi jam je la 17a horo, ni trafis nin ĉe la restoracio 'Garçons' ĉe la Badena Stacidomo.**

**En oktobro ni trafis niajn samideanojn el Saint-Louis kaj ĉirkaŭaĵo en la restoracio  “Porte de France” en Saint-Louis por agrabla babilado. Bone estas se ĉiam almenaŭ unu reprezentanto de la Bazela grupo ĉeestas.**

**En novembro ni denove kunvenis por fari nian programon kaj fiksi la detalojn.**

**Estonte niaj bazelaj novaĵoj aperos aldone en la revuo  'La Informilo' de Esperanto-France Est. Tiel por la redaktoro de la 'Informilo' kaj de 'Sudrejna Kuriero' estos malpli da laboro. Ni dankas al li ke li faras tiun laboron bonege. La revuo estos alportita al la 'Porte de France', disdonita aŭ dissendita en Svislando.**

**Nicole Béroud**

**Mia propono estas:** sendi al la kutimaj ricevantoj de SRK de la Bazela Grupo nian regionon revuon "La Informilo", kiu aperas 4-foje jare. En ĝi eblas enŝovi unu folion kun specifaj informoj de la grupo. Detalojn mi interkonsentos kun Nicole.

Andreo

# Esperanto – Societo Basel
# Ĝenerala jarkunveno

**Ni invitas vin por ĵaŭdo la 25.02.2019 al la Ĝenerala Jarkunveno, en nia kunven-loko en Riehenring 131**

**Komenco je la 17h**

1. **Bonvenigo**
2. **Elekto de la tagprezidanto**
3. **Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno 2018**
4. **Aliĝoj kaj eksiĝoj**
5. **Raportoj** a) de la prezidanto<br>b)de la kasisto kaj kaskontrolantoj
6. **Senŝarĝigo de la estraro**
7. **Elektoj** a) de la prezidanto<br>b) de la vicprezidanto<br>c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj<br>d) de la sekretario
8. **Kontribuoj** a) al CDELI<br>b) al pacmovado
9. **Proponoj**

**Tiujn bonvolu skribe prezenti ĝis la 15-a de februaro 2019 al Esperanto Societo Basel.**

**Esperante, ke vi multnombre partoprenos, ni salutas vin samideane.**

**La estraro**

**Kiel kutime ni aldonas enpagilon por la jarkotizo al tiuj personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al la kasisto. Anticipan dankon.**

**Membro unuopa CHF 25.-**

# Invito al Zamenhof-festo en Frajburgo 15a de decembro 2018

**Ni invitas kore al la regiona Zamenhof-Festo 2018 de Triangula Lando Sabato la 15a de Decembro, en Freiburg im Breisgau [Frajburgo]**

Ni renkontiĝos je la 11:30 en la halo de la ĉefa stacidomo en Frajburgo.

Promenos dum 5 min al la Colombi-Schloessle [Kolombi-kasteleto],-kiu situas en la Kolombi-parko.

En la parko ni informos pri la vitokultivado, vinberujoj, kiuj estis alportitaj de la Romianoj.

La Kasteleto prezentas la prahistorion de nia regiono (antaŭ 10.000 jaroj) ĝis la alveno de Romianoj kaj poste Alamanoj.

Poste eblas tagmanĝi en proksima afgana restoracio. De tie eblas promeni tra parto de la malnova urbo; finfine la katedralo estas fin-restaŭrita.

Ankaŭ eblas viziti la Kristnaskan Fojron ĉirkaŭ la urbodomo.

Ni planas 3 diversajn grupojn-laŭ viaj preferoj.

Por kafumado ni renkontiĝas (ek de 14:00) en la “Treffpunkt” (pordo-kodo 4451E) en Schwabentor-Ring 2; se la kodo ne funkcias, bonvolu sonori je Raŭm 5 aŭ “Treffpunkt”.

Krom kafo kaj sezonaj frandaĵoj eblas prezentaĵoj, personaj kontribuoj, rakontoj (bonvolu anonci vian kontribuon-por iomete plani). Informiloj kaj libroj malnovaj kaj novaj.

jen nia nova retejo: www.esperanto.de/de/enhavo/esperanto-freiburg-und-der-welt

Se vi venos rekte-ekz-e per aŭto-por trovi la lokon: iru al “Lageplan Treffpunkt-Freiburg”, kaj tie al Anfahrt. Parki eblas proksime en Schlossberggarage (pagenda), aŭ iomete pli fore en stratoj.

Por aliĝi, oferti vian kontribuon, demandi, bonvolu skribi al Manfred (ĉe) Westermayer.de

Bonvenon, amike salutas la Frajburga esperantistaro




**A quitté son poste à l'Université de Haute-Alsace UHA le 30 août 2018**

Skribas Bernard Behra al Yann Kerdiles

*Funkcio ĉesas, la esplorado daŭras. Konscia vivo ne povas esti travivata sen konstanta laboro de la lingvo laŭ ĉiuj el ĝiaj formoj. Sen la lingvo ni havas nenion por kompreni, lerni, pensi, diri, komuniki, instrui. Intelektulo restas vivanta kaj utila kiam li ne ĉesas mirigi pri la lingvo, ĝin studi, analizi, mediti kaj zorgi pri ĝi. Sen la lingvo ne estas scienco, nek sciado, estas nenio, ĉar estas doni nomon al la aĵoj, kiu donas al ili ekziston. La emeriteco do nur povas esti feliĉa. Mi deziras tion al vi. Kaj dankon pro viaj lingvistikaj engaĝiĝoj.*

*Une fonction cesse, la recherche continue. La vie consciente ne peut être pleinement vécue sans le travail constant du langage sous toutes ses formes. Sans le langage nous n'avons rien pour comprendre, apprendre, penser, dire, communiquer, enseigner. Un intellectuel reste vivant et utile tant qu'il ne cesse pas de s'étonner du langage, de l'étudier, de l'analyser, de le méditer et d'en prendre soin. Sans le langage, il n'y a pas de science, il n'y a pas de connaissance, il n'y a rien, car c'est donner un nom aux choses, qui leur donne une existence. La retraite ne pourra donc être qu'heureuse. Je vous le souhaite. Et merci pour vos engagements linguistiques.*

*Yann Kerdiles Quel beau texte Bernard! Merci! Il va me falloir du temps pour bien y répondre... je crois que je vais t'envoyer un de mes poèmes. Et merci pour le texte en Espéranto : il va falloir que je me hisse à cette hauteur là!*


Jen Bernard informas nin pri la plej bela pejzaĝo de Lisbono:

Temas pri la legaĵoj, kiujn – malgraŭ la varma etoso de la kongreso kaj la varmega vetero en Lisbono – li tamen sukcesis aĉeti dum la Universala Kongreso ĉe la libroservo kaj dum la aŭkcio.



*Dum la Kongreso en Lisbono mi aĉetis la libron de Carlo Minnaja: Historio de la Akademio de Esperanto. Mi ĵus finis legi ĝin. Grava kaj interesega verko, kiu bonege kaj fine, post longa atendo, plenigas en la movado veran mankon ĝis nun. Elstara verko. Mi dankas kaj gratulas la aŭtoron: Carlo Minnaja.*

Kaj Carlo respondis: *"Mi dankas pro la interesiĝo kaj ĝojas, ke leganto trovis ion ŝatindan. La verko eliris el la presejo fine de junio, tial eblis mane alporti ĝin al Madrido ĉe la HEF-kongreso kaj al Lisbono; por enretigo necesas iu kiu havu la tempon enretigi. Kompreneble ĝi estos havebla (kaj estos prezentata) ankaŭ dum la itala kongreso en San Marino. Recenzoj ankoraŭ ne aperis, laŭ mia scio. Sed la epiteton "elstara verko" mi jam konsideras recenzo; dankon!"*



# Mulhouse-Esperanto jam antaŭ 109 jaroj

Dum la aŭkcio de la Universala Kongreso 2018 de Esperanto en Lisbono Bernard aĉetis etan broŝuron, kiu estas la statuto de la Esperanto-Asocio de Mulhouse. Laŭ tiu dokumento oni jure kreis la asocion en 1911. La statuton estas en germana ĉar en tiu epoko Mulhouse estis ankoraŭ en Germanio. Tri stampitaj nomoj aperas sur la unua paĝo. Temas verŝajne pri la fondintoj de la asocio kaj de la membroj de ĝia unua estraro. Do tio estas verŝajne naskiĝo-akto de Mulhouse-Esperanto kaj la komenco de Esperanto en Mulhouse







Nia nuna asocio **Mulhouse-Esperanto** estis oficiale deklarita en 1993, do antaŭ 25 jaroj



**Satzung**

des

**Mülhauser Esperanto-Vereins.**

**Name, Sitz und Zweck des Vereins.**

§ 1.

Der Verein führt den Namen:

**Esperanto-Verein-Mülhausen (E. V. M.)**

Sitz des Vereins ist Mülhausen.


Zweck des Vereins ist die Ausbreitung und Pflege der internationalen Hilfssprache Esperanto in jeder geeigneten Weise, namentlich durch Unterrichtskurse, Versammlungen, Vorträge, gesellige Zusammenkünfte, Unterhaltungsabende u. s. w. Die Verfolgung politischer und religiöser Zwecke ist ausgeschlossen.

Der Verein ist eine Ortsgruppe des Deutschen Esperanto-Bundes und erkennt dessen Satzung als für sich bindend an.

**Vereinsjahr.**

§ 2.

Das Vereinsjahr läuft vom 1. Januar bis 31. Dezember.



**Mitgliedschaft.**

§ 3.

Ordentliches Mitglied kann jede unbescholtene schulentlassene, über 16 Jahre alte Person werden, welche die internationale Hilfssprache Esperanto lernen oder üben will. Bei Ausnahmefällen ist der Vorstand zuständig, jedoch haben Personen vor dem vollendeten 16. Lebensjahre kein Stimmrecht.

Ueber die Aufnahme entscheidet die Mitgliederversammlung. Doch hat der Vorstand das Recht, Aufnahmegesuche ohne Angabe von Gründen zurückzuweisen. In diesem Falle steht dem Abgewiesenen Berufung an die nächste Mitgliederversammlung frei.

Die Mitgliedschaft läuft weiter, wenn nicht bis zum 30. September jeden Jahres der Austritt dem Vorstand angezeigt worden ist.

**Jahresbeiträge.**

§ 4.

Der in Monatsraten zu zahlende Jahresbeitrag beträgt für ordentliche Mitglieder 6 Mk.

Aufnahmegebühr 1 Mk.

**Rechte der Mitglieder.**

§ 5.

Die ordentlichen Mitglieder haben Stimmrecht in den Mitgliederversammlungen, aktives und passives Wahlrecht zu den Vereinsämtern.

Der Unterricht ist für alle Mitglieder unentgeltlich. Die für Kurse gezahlten Honorare werden bei der Aufnahme auf den Jahresbeitrag angerechnet.

Die Benützung der Vereinsbibliothek untersteht einem speziellen Reglement.

# Jar-fina komuna manĝo en Bartenheim junio 2018



Por kune festi la finon de la lerno-jaro, nia asocio Mulhouse-Esperanto, kunvenis en la restoracio "Auberge Alsacienne" de Bartenheim.
Plej multaj preferis merkredon la 13an de junio.
Certe en la monato junio ankaŭ okazis "Amika Tago" en Frajburgo kaj kiel kutime en la lasta lundo de la monato nia "Verda Fadeno".

La "Amika Tago" okazis la 23an de junio kaj estis ĉi-jare organizita de la aktivuloj en Frajburgo, nome Ursula kaj Manfred.
Tiam ni kune vizitis la muzeon centre de la urbo en la turo "Schwabentor". En diversaj dioramoj estis rakontitaj historiaj eventoj de la lastaj jarcentoj.
Iom super la urbo en la kaŝtanoĝardeno eblis pikniki aŭ akiri varmajn manĝojn.



Lunde la 25an de junio ni refoje renkontiĝis por la verda fadeno en Saint-Louis.
Pluraj el ni partoprenis la somerajn renkontiĝojn en Madrido (ILEI-kongreso) kaj Lisbono (UK)

Andreo

# Niaj Verdaj fadenoj en Rixheim fine de septembro kaj en Saint-Louis fine de oktobro

En Rixheim ni kuniĝis la 24an de septembro. Ni estis 8 personoj.
Bernard laŭdis kaj montris al ni la libron "Historio de la Akademio". Andreo kunportis la libron el Ĉinio "Teo kaj Amo". Odette instigis nin por solvi krucvortenigmon. Tiam ni ja lernis plurajn novajn vortojn.
Okazis babiladoj pri pasintaj kongresoj en Madrido kaj Lisbono kaj ankaŭ pri venontaj aranĝoj, nome al Heidelberg por la aŭtuna staĝo.

**Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj**.

- 29an de oktobro 2018 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 26an de novembro 2018 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 28an de januaro 2019 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 25an de februaro 2019 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 25an de marto 2019 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 29an de aprilo 2018 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 27an de majo 2019 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 24an de junio 2019 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.



# Informbudo en Wesserling ĉe Festo de la Libro

## Teksto de Roberto K.

La 30an de septembro 2018, okazis la "Festo de la libro" kiel ĉiujare en aŭtuno en la "Parko de Wesserling", organizita de la mediateko.

Mi enskribiĝis por la prezentado de Esperanto, je la nomo de la asocio Esperanto-France, kaj estis akceptita malgraŭ la multnombraj aŭtoroj, elsendejoj. Estas ja la evento en "mia valo"!

Sur tablo malpli longa ol du metroj, mi deĵoris de la deka ĝis la sesa vespere. Kutima vizitado al la budo, sed ni ne revu, malmultaj interesoj!

Kiam iu vizitantino alparolis min en la internacia lingvo. Ha!

"Mi ĝojas, sinjorino! De kie vi venas?" "De Brazilo!".

Ŝi bone parolis, malgraŭ (laŭ ŝi), ke ŝi ne plu parolis Esperanton de dudek jaroj, de kiam ŝi loĝis en Alzaco, kie ŝi ekrenkontis sian edzon!

Kaj kiamaniero ŝi venis al Alzaco? Per iu esperantistino, kiu eklernis la lingvon antaŭ dudek jaroj … en la sino de Mulhouse-Esperanto, …kaj kiu korespondis kun brazilaj esperantistoj, eĉ iĝis bapto-patrino de infano kiam ŝi restadis en Brazilo, mi nomu … Laurence Reibel. Kurioze, ne?

Mi invitis ŝin havi kontakton kun nia asocio "Mulhouse-Esperanto".

Mi donacis al ŝi ekzempleron de "La Informilo" en kiu estas referencoj de la prezidanto, de la kasisto … kaj de la sekretario. Mi klarigis, ke niaj ĉefaj renkontoj estas la venonta staĝo en Heidelberg, kaj la loka en Mulhouse estos la tradicia renkonto de la "Trireĝa festo" komence de januaro. Mi petas de ŝi kontakti nin antaŭ Kristnako por ricevi ekzempleron de SRK. Laŭ mia ideo, mi ne volas perforteti la homojn al decido, konstante "relanĉi" ilin, sed lasi al ili libere decidi kion ili deziras! Same mi respondis al iu virino de Saint-Amarin, kies demando estas: kiel oni povas eklerni Esperanton?

"Vi havas ŝancon, mi loĝas en Geishouse", donante al ŝi ekzempleron de "La Informilo". Ni atendu, la interesatoj decidos!

Tiel estas mia "politiko" de varbado! VI decidu!




La aŭtuna regiona staĝo okazis ĉi-jare iom pli norde, en la ĉarma urbo Heidelberg. Kiel veturi tien?

Helpe de Manfred el Frajburgo, kelkaj samideanoj sukcesis favorkoste uzi la germanajn regionajn trajnojn por atingi la urbon. La staĝejo estis la vasta Junulargastejo de Heidelberg, kie kunvenis ankaŭ aliaj grupoj.

Inter la partoprenantoj ankaŭ aliĝis pluraj gejunuloj.

En la vespera programo troviĝis la interesa prelego de Karl Breuninger, kiu rakontis pri sia propra vivo post la dua mondmilito, kiam lia patro, aviad-fakulo, kaj la tuta familio devige translokiĝis al Rusio. Tie lia patro laboris kiel aviad-fakulo, dume li havis malpli streĉan vivon en sur-lokaj lernejoj, eĉ iam ferianta ĉe nigra maro.







Por la distra parto de la vespero Christoph Frank prezentis amuzajn rakontojn per multfaceta libro.

Sabate matene refoje okazis la diversaj kursoj, por komencantoj 1 kaj 2, la paroliga kurso, kaj la "bukedo" kun diversaj prelegoj.

Ulrich Brandenburg prelegis pri la malfacila temo "Rusio nia najbaro". Li skizis diversajn politikajn situaciojn en la lastaj jardekoj kaj nuntempe. Ĉe la fino estis kuraĝige, ke li tamen restas optimisma pri la estonteco.

Posttagmeze ni ekskursis per busoj ĝis la malnova ponto super la rivero Neckar. Fore eblis vidi la malnovan kastelon. Post transiro de la ponto ni atingis la malnovan urbon. Evidente Heidelberg estas universitata urbo kaj en tiu sabato svarmis multaj homoj kaj ĉefe gejunuloj tra la stratoj. Tie abundis kafejo kaj restoracioj, iuj kun lokaj specialaĵoj.



En la vespero revenis la magiisto Christoph Frank por magia kaj fantazia vojaĝo tra la mondo, ĉiam kun novaj surprizoj.

Dume ankaŭ deĵoris Jean-Luc ĉe la libroservo. Li prezentis al la publiko la novajn akiritajn librojn.

Dimanĉe matene la prelego temis pri Afriko, nome la Respublikon Kongo.

Manfred prelegis pri helpo al iuj vilaĝoj por havigi al ili la trink-akvon. Por tio necesas meti akvo-tubojn de fora torento kaj instali man-pumpilojn.



Alois ankaŭ parolis pri la sama lando, sed pri la nuntempaj konfliktoj kaj eĉ militoj ĉe la landlimo kun Ruando.

**Ni kore dankis al la organizantoj kaj memorigis, ke la printempa staĝo okazos en venonta majo en Strasburgo.**

Andreo

# TEO kaj AMO.




En la numero 180 de la Informilo aperis raporto de ĉina delegacio, kiu vizitis Pollandon kaj pri la ceremonio TEO kaj AMO.

Ankaŭ aperis libro pri tiu evento kun 312 paĝoj. Ĝi estas mendebla ĉe nia kasisto je **15 eŭroj + 3 eŭroj da sendkostoj.**

La libro estos sendita al via adreso rekte el Pekino Ĉinio.

La libro estas dividita en kvar partoj. La unua, Teo kaj Amo, prezentas teon kaj la projekton "Teo kaj Amo" per interesaj rakontoj, kiuj klarigas interalie pri la ĉina ideografiaĵo 茶 (pinyin cha, esperante teo), la ĉina te-etiketo, Teo kaj Amo kaj prezentas tagnotojn de alilandaj partoprenantoj de la unua filmofestivalo "Teo kaj Amo", okazinta en 2015.

La dua parto, titolita Urboj de "Teo kaj Amo", prezentas la urbojn Hangzhou, Jingning kaj Dushan, en Ĉinio, Visaginas en Litovio, Nový Jičín kaj Svitavy en Ĉeĥio, kaj Bjalistoko kaj Bielsko-Biała en Pollando.

En la tria parto, Anĝeloj de "Teo kaj Amo", partoprenintoj de la filmokonkurso "Teo kaj Amo" rakontas pri siaj spertoj aŭ prezentas la tekston de siaj filmetoj. En tiu parto ankaŭ troviĝas intervjuo de Ĝoja al revuo Kontakto 274 (2016:4) tekstoj de kantoj uzitaj en muzikfilmoj faritaj por la filmokonkurso. Artikolo de LEE Jungkee, estrarano de UEA kaj membro de la ĵurio de la konkurso "Teo kaj Amo", enkondukas tiun ĉi parton de la libro kaj prezentas la gravecon de tiu konkurso.

La lasta parto de la libro, Vortoj de "Teo kaj Amo", prezentas fotojn kaj subskribojn de kunlaborantoj el pluraj landoj. Apud ĉiu foto legeblas la frazoj "Teo kaj Amo", "Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?" kaj "La mondo pleniĝu de tea aromo!" en la denaska lingvo de la persono, kiu ankaŭ kontribuis per frazo, legebla en la denaska lingvo kaj ankaŭ en Esperanto.

# Nia Kalendaro 2018

| | | |
|---|---|---|
| **Oktobro**<br><br>**2017** | **9 - 16**<br><br><br>**29** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Ni kune decidos pri la horoj kaj tagoj.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |
| **Novembro**<br><br>**2017** | **6 - 13 - 20 - 27**<br><br>**26**<br><br><br><br>**17-18** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio La Pataterie rue de l'Aérodrome, 68170 RIXHEIM<br>Ekologia foiro en Ungersheim. Ni deĵoros tie por informi pri la lingvo. |
| **Decembro**<br><br>**2017** | **4 - 11 - 18**<br><br>**15** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Zamenhof-festo en Frajburgo laŭ la programo |

# KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2019-2021

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Reta versio (pdf) | Papera versio | Kolora ekzemplero |
|---|---|---|---|
| 2019 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2020 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2021 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.







## Internacia semajno de Turismo kaj Kulturo



*Fotoj Andreo*

